

Friedrich Schiller,

Al la ĝojo

tradukita de Kálmán Kalocsay

Ĝoj'! Fajrero belradia!
 Elizea di-filin'!
 fajrebrie ni al via
 templo iras, preĝi vin.
 Ĉesu, de vi sorĉligate
 de l' rigora mod' la ŝir',
 ĉiuj homoj sentas frate,
 se vi ŝirmas perflugil'.

Ĥoro:

Jen brakumoj al milmiloj,
 Jen ĉi kis' al tuta mond'!
 Fratoj! super stela rond'
 loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
 kaj amikon gajnis vi,
 se virina am' vin ravis:
 Vin enmiksu kun ĝojkri'!
 Jes, se eĉ nur unu koro
 estas via en la mond'!
 Kaj se ne – do vin kun ploro
 ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:

Ĉiu sub ĉielo ĝlata
 donu sin al simpati',
 al la steloj gvidas ĝi,
 kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
 suĉas sukcon de la ĝoj'
 kor' malbona, koro pura
 sekvas ŝin laŭ roza voj'.
 Ŝi vinberojn, kisojn donas
 kaj amikon sen pridub',
 en volupt' la vermo dronas,
 vidas Dion la kerub'.

...

Ĥoro:

Ĥu genuas vi, milmiloj?
Vi kreinton sentas, mond'?
Serĉu super stela rond',
loĝas Li trans astro-briloj!

En eterno de l' Naturo
Ĥojo estas la risort'.
En la mondhorlog' por kuro
radojn pelas ŝia fort'.
Ŝi el ĝerموj logas berojn,
sunojn regas ŝia gvid'
Ŝi tra l' spaco rulas sferojn
trans la astronoma vid'.

Ĥoro:

Kiel sur la pompaj vojoj
sunoj sur la firmament',
gaje marŝu, frata gent',
kiel venki la herooj!

Esporiston ŝi alridas
el la fajrspegul' de l' Ver',
sur krutaj' de l' Virto gvidas
ŝi la homon de toler',
sur Kred-Monto sunobrila
flirtas ŝia flag' el or',
ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila
vidas ni en anĝel-ĥor'.

Ĥoro:

Ho toleron, paciencon,
fratoj, por pli bona mond'!
Donos super stela rond'
granda Dio rekompencan!

Ĥu pripagi diojn? Vanto!
Ĥu simili? Bela pen'!
Venu ĝoji kun ĝojanto
la mizero, la ĉagren'.
Venĝ'? Koler'o? En forgeson!
Jen pardon' al malamik'!
Liaj larmoj havu ĉeson,
lin ne boru pento-pik'.

...

Ĥoro:

En ŝuldlibroj plu nenio!
Mondon regu harmoni'!
Fratoj! Kiel juĝis vi,
tiel juĝos pri vi Dio!

Ĥojo ŝaŭmas en pokaloj,
en orsango de l' vinber',
mildon trinkas kanibaloj,
heroecon malesper'.
Se rondiras la botelo,
fratoj, saltu el la sid',
ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:
Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!

Ĥoro:

Himnas Lin abismo stela,
serafar' kun glora cit'.
Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',
supre, trans la tend' ĉiela!

En suferoj: firma forto,
al senhelpaj: ŝirma Brust',
eterneĉ' al ĵura vorto,
eĉ al malamiko: just'.
Virfiero kontraŭ tronoj,
kvankam sangon kostu spit',
al merito estu kronoj,
kaj perejo al insid'!

Ĥoro:

Fermu vin en sankta rondo,
Ĵuru do kun glaso-lev',
pri l' fidelo al la Dev',
je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, *1759 – †1805) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976) en 1958.*

Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)